# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.eu/kajeroj/k74.html




Nro 74a Aprilo/decembro de 2007

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

**ISSN 1697-6460**

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Manuel Pankorbo,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Vytautas Ŝilas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
11 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
12 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***nova konto nº 2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 10 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: En Zaozhuang (ĈINIO), la 20an de oktobro, kadre de la «2a Internacia Festivalo de Esperanto», okazinta en la urbo Zaozhuang (Ĉinio) oni inaŭguris solene novan ZEO-n, nome, monumento memore al D-ro Zamenhof. La skulptisto estis Sun Jingbao, membro de la loka esperanta asocio.Laŭdire, ĝi estas la plej granda tiutipa en Azio. La kosto de la monumento estis kovrita pere de mondonacoj de esperantistoj el diversaj landoj, ĉefe ĉinaj, koreaj kaj japanaj, kaj kompreneble lokaj. Al tiu afero multon kontribuis la lokaj instancoj kaj universitato.

*Aŭgusto Casquero*

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

## Enhavo

Redaktore: La prokrasto ..... 3
Parolas la Prezidanto ..... 4
Krizaj ventoj en Hispanio ..... 5
Ni bruligu la flagon de la Respubliko! ..... 6
Pri dekstro kaj maldekstro ..... 8
La 18-a Kongreso de VEFkM ..... 11
Vojaĝu en Esperanto-landon! ..... 12
Lernu Esperanton per la Bek-Kurso! ..... 14
Studsesio en Bydgoszcz ..... 15
La Faraono, ĉapitro 20ª (finota) ..... 16



Redaktore

# La prokrasto

La jaro 2007 ne estis tre bonŝanca por nia asocio. Pro diversaj kialoj ni ne ricevis la koncernajn numerojn de ĉi tiu magazino, kvankam trifoje ĉi tiu numero estis preskaŭ finita. Sano kaj aliaj problemoj malhelpis ĝian pretigadon, sed mi esperas, ke post kelkaj tagoj vi ricevos ĝin finfine. Mi intencis, eĉ se prokraste, sendi la tri ŝuldatajn numerojn, sed ŝajnas, ke ĉi tiu numero estos triobla, eĉ se la nombro da paĝoj estas la kutima.

La komencon de ĉi tiu lernojaro ni estis instruontaj kurso de Esperanto en Jeklo, la nordorienta parto de Mursjo, sed finfine la afero ne progresis, ĉar estis balotado kaj la koncerna loka konsilanto pri kulturo ŝanĝis, kaj tiu nova ne estas tiom favora al nia lignvo.

Dum tiuj monatoj estis diversaj politikaj aferoj en Hispanio, kiuj atentigis nian intereson. Viktimoj pri terorismo manifestaciis kelkajn fojojn, teroristojn oni ne intencis persekuti, sed finfine oni arestis ilin kaj nun persekutas, la *partio de la dekstro* estis kalumniita kiel kutime, sed finfine oni petas ĝian helpon pro la *unuiĝo de demokratuloj*.

Kelkaj samideanoj kritikas, ke iel ***Kajeroj el la Sudo*** iĝas politika magazino, kaj eĉ *malbona* politiko. Tio ne estas vere. Sed ni ne vivas en utopilando, sed en koncerna lando, kie estas socialaj kaj politikaj ŝanĝoj. Ni ne povas diri, ke ni ne estas homoj de nia tempo. Mi opinias, ke nia magazino devas iel respeguli la etoson de la lando, kie ĝi estas farita. Eĉ pli, se oni konsideras, ke plejmulto da legantoj niaj loĝas en Hispanio.

Eble tio ne kongruas multe kun tiu koncepto, sennaciismo. Nu, ni ne defendas *karan patrion*, sed fakte primokas ilin ĉiujn, aŭ notigas ĝian mizeron. Pro tio ni ankaŭ primokas kaj notigas la mizeron de tiuj patrietoj, kiuj nun svarmas en Hispanio.

Mi denove pardonpetas pro la prokrasto, kaj klopodos ne ripeti tion.

Elkore salutas,

*Jesuo*



# Parolas la Prezidanto

Estimataj gehaleanoj antaŭ longa tempo estro de la komunisma partio de Hispanio, Santiago Carrillo, diris "la problemo ne estas ĉu monarĥio ĉu respubliko: la problemo estas ĉu diktaturo, ĉu demokratio".



Mi diras tion ĉar dum la lastaj semajnoj en Hispanio la anoj de porrespublika manifestacio esprimis sian deziron, ke en Hispano ekestu Respubliko.

Liaj argumentoj estas.

1e La **reĝo ne** estas **elektita** kaj liajn **elpezojn ĉiuj hispanoj pagas**. Mi konsentas, sed ĉu prezidanto de Respubliko ne havos elpezojn?, ĉu Respubliko estos senpaga? Mi demandas, se vi diras ke la Respubliko estos senpaga, mi diras jes al la Respubliko.

2º La **problemon nacian solvos Respubliko**, ĉar ĝi estos Federacia Respubliko. Mi konsentas, se la Respubliko definitive solvos la problemon pri la nacio, sed la nova Respubliko havos konstitucion, kaj laŭ la aktuala konstitucio la regionoj de Hispanio havas pli da povo ol la aŭtonomaj regionoj de la Federacia Respubliko de Germanio. En tiu ĉi momento en Hispanio estas Federacia Monarĥio, kiu, laŭ libroj pri politika scienco, estas politika novaĵo.

La plej forta Respubliko de Europo, Germanio, estas pli centrisma ol la Monarĥio de Hispanio, kaj pro tio mi opinias, ke la nova Respubliko estos pli centrisma ol la aktuala Monarĥio, ĉar ĝia modelo estas la Federacia Respubliko de Germanio.

La elpezoj de la Monarĥio estas pli malaltaj ol la elspezoj de la Franca Respubliko. La gereĝoj de Hispanio elpezas malpli da mono ol la Prezidanto de la Franca Respubliko, kaj ni nur pagas unu reĝon, sed la popolo de Francio pagas tri aŭ kvar Prezidintojn de la Respubliko.

Kiam ni diras tion niaj samideanoj de la maldekstro diras: *vi estas faŝistoj!* Ni devas kompreni kaj esti toleremaj, ĉar ili estas kreduloj: ili ne havas religion, sed ili estas kreduloj, kaj kreduloj ne pensas, sed kredas.

Respublikoj en Hispanio jam fiaskis, kaj ili fiaskis kiam ne havis grandan respublikan partion, kaj pro tio la anoj de la respubliko estis socialistoj kaj komunistoj. Mankis forta partio respublika.

Manuel Azaña, Prezidinto de la lasta Hispana Respubliko, estis ano de la Kongreso per helpo de la socialista partio (PSOE), dum la balotado de 1933.

La plej forta partio republika estis la Radikala Partio, gvidata de Alejando Lerroux, politikisto taŭga por la literaturo de Alejandro Dumas, sed ne por tiu politiko, kiun bezonis Hispanio en tiu momento.

Li estis gvidanto de la Radikala Partio, kiu havis povon pro la dekstro de Hispanio, per la CEDA[1].

Tio signifas ke Manuel Azaña estis kongresano pro la helpo de PSOE, kaj Alejandro Lerroux havis povon pro la helpo de la CEDA.

Kaj tiun ĉi momenton ne ekzistas granda partio respublika en Hispanio, do respublikanoj bezonas PSOEn, same kiel dum la lasta Respubliko.

La problemo, kiel diris Santiago Carrillo, ne estas Monarhio aŭ Respubliko, sed ĝi estas, ĉu diktauro ĉu demokratio.

En la venonta numero mi parolos pri la aktuala diktatoreco de la kreduloj, ĉu destraj. ĉu maldekstraj.

*Johano Cabezos,*
*Prezidanto de HALE*

[1] Konfederacio Hispana de Dekstroj Aŭtonomaj, en la hispana lingvo: Confederación Española de Derechas Autónomas.

# Krizaj ventoj en Hispanio

Estas ofte aŭdi la hispanan ĉefministron Zapatero, ke la ekonomio iras bone kaj ni eĉ atingos la germanan nivelon post malmultaj jaroj. Tamen, tiuj optimismaj asertoj ne kongruas kun la realo; verdire, la financa situacio estas delikata por multaj familioj kaj alvenas pluraj krizo-signoj.

Unue ni rigardu la MEP-on (Malneta Enlanda Produkto), grava mezurilo kiu adicias la tutan ekonomian produktadon de unu jaro en konkreta teritorio. En 2006, la oficiala datumo estas 3.9 elcento, kio ŝajnas pozitiva unuavide.

Tamen, jara kresko de MEPo fariĝas absolute bagatela se ni ne kalkulas je la ŝanĝiĝoj en la loĝantaro. En la lastaj jaroj eniris multegaj enmigrantoj, kies nombro ne eblas kalkuli (laŭ kelkaj, la cifero povas superi po 100.000 homojn monate) Rezulte, nia porpersona enspezo stagnas, kaj la malplej kvalifikitaj laboristoj iom post iom perdas aĉet-povon.

Unuafoje, ekde la 70-aj jaroj la laboristaro ricevas malpi ol 50 elcento de la riĉeco. Kompreneble, je la alia flanko de la medalo estas multaj entreprenistoj por kiuj la malaltaj kostoj rezultas ege profitdonaj.

La kresko-modelo baziĝis en la lastaj jaroj ĉefe sur unu sektoro: la konstruado. Prezoj freneze kaj spekule altiĝis kaj dume neniam ekzistis tiom da neuzitaj leĝejoj. Fakte, multaj propietuloj rezignas enspezi per lu-donado, ĉar la leĝoj nesufiĉe protektas ilin. Sub granda hipoteka pezo vivas multaj familioj. Oni povas prognozi abruptan malpliiĝon de la dom-prezoj (kiel okazis en Japanio) kun malagrablaj sekvoj kaze de altiĝo de interezo, kiel opinias profesoro pri Publika Trezoro José Barea. La milionoj da eksterlandanoj laborante en tiu sektoro povas perdi vivrimedon.

La estonto por multaj laboristoj estas malcerta. La junuloj ne povas fidi je la ŝtataj emeritiĝaj pensioj kiuj fariĝos neelteneblaj laŭ la nuna sistemo. La politikistoj ripetadas, ke pli da enmigrintoj necesos por sekurigi la sistemon. Tamen je longa perspektivo tiuj homoj devos ricevi pension multe pli grandan ol tio kion oni estis paginta.

Por ne komplikigi kaj troe plilongigi la artikolon, mi citu kelkajn aliajn problemojn kiuj malutilas al nia bonfarto: disiĝo de la centra ŝtato rompante la merkatojn, grandega ekstera deficito, perdo de konkur-povo kompare kun eŭropo, fiaska edukad-sistemo, politika malcerteco, malalta naskiĝokvanto, pliiĝo de la impostoj, miselspezo de publika mono, malraciaj leĝoj, krimo, ktp.

Tiuj ĉi problemoj estas strukturaj kaj ne cirkonstancaj, kaj do, la krizo estos pli malfacila ol simpla ŝanĝiĝo de la ekonomia ciklo. Ni esperu tiam laboron. Intertempe, s-ro Zapatero denove bombastos ridetante por klopodi konvinki nin pri siaj atingoj.

*Jorge Pavón*

# Ni bruligu la flagon de la Dua Respubliko!

Je kelkaj etosoj hispanaj, ĉefe mal-dekstraj, oni emas sanktigi la flagon de la Dua Respubliko. Tiu flago havas tri zonojn, ruĝan, flavan kaj violan. Oni diras, ke la nuna flago, kun unu flava zono inter du ruĝaj zonoj duonlarĝaj al tiu flava, estas tiu flago «de Franko, la



Diktatoro». Pro tio, en publikaj ma-nifestacioj, de multe da jaroj mal-dekstruloj svingas la trikoloran, kaj ĵuse oni lasis ĝin sur la plej alta loko de la fama statuo je la Placo de Cibeles, en Madrido, kaj neniu forprenis ĝin... Post unu tago, venis purigistino, kaj metis ĝin en rubujon.

Tio pensigis min, ke fakte tiu estas la plej konvena loko por tiu flago. Mi scias, ke plej multe de la hispanaj legantoj de mia artikolo koleros kontraŭ mi, kaj eĉ rezonos, ke mi faras maljustan atakon al simbolo de libereco, egaleco kaj frateco.

Sed la flagon svingas komunistoj kaj socialistoj. Tiuj partioj repondecas pri multe da murdo dum la Dua Respubliko, kaj antaŭ la intercivitana milito kaj dum ĝi okazis. Dum junuloj batalis por siaj lando, nacio, familioj, ktp, kvin mil socialistoj kaj komunistoj murdis homojn pro tio, ke ili ne aprobis siajn ideojn revoluciajn. Kaj ili faris tion sen honoro kaj kun torturado de senkulpuloj. Nun anoj de tiuj partioj postulas, ke la Popola Partio pardonpetu pro tio, kion oni faris

dum la Diktatoreco de Francisco Franko. Sed la Popola Partio ne ekzistis dum la 40 jaroj de tiu diktatoreco. Tamen, la Komunisma Partio de Hispanio kaj la Partio Socialisma Laborista Hispana (PCE kaj PSOE, hispane) ne nur ekzistis, sed ili estis la registaro de la Respubliko dum tiuj jaroj, kiam oni enkarcerigis, torturis kaj rabis homojn pro la grava krimo ne esti revoluciismaj aŭ ne sufiĉe arde revoluciismaj, kiel la anoj de POUM (Partio Laborisma Unuiĝinta Marksisma), kies gvidanto, Andreo Nin, estis senhaŭtigita antaŭ oni murdis lin.

Oni volas kompari la Duan Respublikon Hispanan kaj la Francan Revolucion. Dum tiu ĉi, evidente estis troigoj. Sed iam, kiam popolaĉo mortigis arbitracie burĝistojn, franca generalo ordonis siajn soldatojn pafi kontraŭ tiuj brutoj, kaj tiel —oni diras— li savis la Francan Revolucion. Sed dum la Dua Respubliko Hispana la armeo estis tiu popolaĉo, kiu forrabis, murdis kaj



Honestaj impoŝtopagantoj bruligante flagon, kiu reprezentas neniun honestan.

bojkotis pacon sinsekve. La Franca Revolucio ne havis ĉekejojn, tio estas, torturejojn por persekuti la kontraŭrevoluciulojn. Do, se oni volas honori flagon de Libereco, de Egaleco, de Frateco, oni honoru la francan flagon. Estus pli konvene, pli honeste. La flago de la Dua Respubliko Hispana estas flago de pravigo de murdo cele al *la bono de la kaŭzo*.

Kaj la kaŭzo estis la starigon de **diktatoreco *de la popolo***, ne la defendo de la demokratio, kiel mensoge asertas nun tiuj senhontuloj, kiuj ankoraŭ ne pardopetis pro la mortigo de kvin mil homoj en Paracuellos de l' Jarama, aŭ de aliaj dekunu mil homoj en la torturejoj.

Sed se oni estas nepre respublika, oni povas porti kaj honori la flagon de la Unua Respubliko Hispana. Dum ĝi ekzistis, ĝi estis ekzakte same kiel la nuna flago de la Reĝlando de Hispanio, krom la ŝildo.

Pro tio, kion mi diris, kiam mi vidas flagon de la Dua Respubliko, mi sentas emon bruli ĝin. Ĝi reprezentis neniam la popolon de Hispanio. La Dua Respubliko venis pro fraŭdo, ĉar neniam estis balotado por decidi, ĉu oni volas respublikon, ĉu ne. Kaj necesis milito por ke la popolo liberiĝu de tiu fia respubliko.

Do, mi daŭre demandas, kiam ni renkontiĝos cele al bruligado de flago de la Dua Respubliko?


Elbrule,

*Jesuo.*
*Jan, 16-a 2006, 02:25*
*http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto-en-hispanio/message/9544*

# Pri dekstro kaj maldekstro

De ĉiam mi aŭdis, ke maldekstro estas bona afero, kaj desktro estas nur defendata de fiuloj, kies sola celo estas malfeliĉigi mizerajn laboristojn. Dekstro estas reakcio, oni diris al mi, kaj maldekstro estas progreso.

En mia kara infanaĝo, kiam mi komencis lernejon, mi trovis, ke estis multe da maldekstruloj, kiel Kristoforo Kolombo, la Katolikaj Gereĝoj kaj Doktoro Fleming, ĉar ili, inter multaj aliaj, provizis progreson al homa raso, se progreso estas pliboniĝo.


Benito Mussolini je sia junaĝo

Poste mi lernis, ke tio, kion kelkaj trovas progreso, aliaj povas konsideri malprogreso, alidirite regreso. Ĉu Isabel' kaj Fernando provizis progreson al hispanoj? Nu, certe al tiuj, kiuj restis en la Ibera Duoninsulo, sed ne al tiuj, kiuj devis forlasi ĝin. Ĉu ili estis forpuŝataj vere? Nu, laŭ tio, kion mi lernis, la forpuŝotoj devis elekti, ĉu kristaniĝi, ĉu forlasi la landon. Do, por kristanoj tiatempaj, la Gereĝoj estis progresemaj (maldesktruloj), sed por nekristanoj ili estis reakciaj, tio estas, dektruloj (reakciuloj).

Kristoforo Kolombo progresigis Kastilion, ĉar li malkovris profite al Reĝino Isabel' tutan kontinenton, Amerikon. Al indianoj, certe, li estis desktrulo, ĉar sekvo de tio estis malboniĝo por li, la indiano: ne plu li povis kvereli kun najbara tribo por forrabi manĝaĵojn aŭ virinon, aŭ eĉ por manĝi la najbarulon mem... Li ankaŭ devis perdi sian lingvon aŭ dialekton, kiu garantiis lin sian triban identecon kaj neeblon komuniki kun malamiko de alia tribo. Li devis forlasi sian naturan emon batali tiun, kiun li ne komprenis, ĉar nun li komprenis najbarulojn pere de tiu fia lingvo farita pli ol kvar mil kilometroj for de lia tribo. Li ankaŭ devis forlasi siajn diojn lokajn, ĉar li vidis, ke la dioj de la blankuloj eŭropaj estis pli povaj. Ankaŭ li devis maldungi siajn sorĉistojn kaj peti helpon de doktoro blanka, eĉ se li postulas monon. Tio estis, indiankulture parolante, regreso. Sed el alia vidpunkto, certe estis tio progreso, ĉar estis pli da paco, pli da justeco, malpli da ignoranteco. Oni ne neglektu la aferon, gravan, ke eŭropanoj enportis malsanojn en la landon, kaj pro tio multe da indianoj mortis, kaj tio estis, certe regreso. Do, ĉu Kristoforo Kolombo kaj sekvintoj estis desktruloj, aŭ maldekstruloj?


Kaj kion diri pri Doktoro Aleksandro Fleming, el Britio? Li provizis homaron per penicilino. Mia avo mortis ĉar kiam li vivis, ankoraŭ ne ekzistis tiu medicino. Sed nun homoj, kiuj suferas pneŭmonion ne plu mortas pro tio, ke penicilinon oni povas havi. Ĉu tio estas progreso? *Certe jes!*, diras leganto, *ĉar multe da homoj ne plu mortas*. Ankaŭ oni ne plu malsatmortas en Eŭropo, interalie, ĉar oni enprenis terpomon el Ameriko. Antaŭ tio, oni ne

konis tiun manĝaĵon en Eŭropo. Sekve, Doktoro Fleming estas maldesktrulo, ĉar danke al li ni havas multe pli da progreso.

Sed tiuj, kiuj ne mortis, uzas naturajn rimedojn, kreas rubon, kaj elspezas aeron, akvon kaj energion. Se ni ne havus terpomojn, penicilinon, kaj unuiĝon politikan, pli da homoj mortus, kaj la vivuloj vivus pli bone. Tiusence, kaj Doktoro Fleming, kaj Kristoforo Kolombo kaj la Katolikaj Gereĝoj estas fiaj dekstruloj, ĉar il provizis regreso por homaro. Eĉ se al individuo ili kvar provizis progreson, kaj sekve ili certe estas maldekstruloj!

Eble la leganto, kiu ankoraŭ legas ĉi tiun artikolon, opinias, ke ĉio estas diskutebla, retaksebla, kaj dogmon —ĉian— oni ne povas konsideri serioze.

Dekstro kaj maldekstro estas konceptoj, pri kiuj oni ade postulas kaj dogmigas, kaj se oni detale konsideras tion, kion oni diras, oni vidas nur personajn gajnojn, sed ne seriozajn alportojn. Oni diras, ekzemple, ke Benito Mussolini estis dekstrulo, ĉar li fondis la Faŝisman Partion en Italio dum la unuaj jaroj de la lasta jarcento. Sed li estis filo de socialisto, kaj li mem estis socialisto, li eldonis ĵurnalojn socialismajn, ***L' Avenire del Lavoratore*** (la estonto de la laboristo) kaj ***Il Popolo*** (la popolo). Sed li eksigis la Italan Socialisman Partion pro tio, ke ĝi estis internaciisma, dum li —kaj sia ideologio— estis naciisma. Fakte, li adoptis la saluton de la antikvaj romianoj, kiuj uzis malfermitan manon, kiu montris, ke ne estas glavo supre kontraŭ la salutato. La alia salutgesto socialisma, pugno en la aero, ŝajnas fakte minacanta, ĉu ne? Jes, mi supozas, ke origine ĝi signifis, ke salajrulo havas nenion en sia mano, neniun monon, sed tion oni ankaŭ povintus esprimi per malplena mano...



Jozefo Ŝtalin', pli granda murdisto ol Hitlero kaj Mussolini kune..., tamen maldekstrulo.

Sed Mussolini ne estis dekstra, laŭ mia kono, eĉ se nun serioze oni asertas tion. Ankaŭ Hitlero ne estis dekstra, ĉar li estis gvidanto de partio kies nomo estis Naciisma-Socialisma (NAZI akronime en la germana..., laŭ mia kono). Sed tiuj du gvidis movadojn en siaj landoj, kiuj estis totalismaj, kaj mallarĝigis individuajn rajtojn de siaj samlandanoj, kiujn ili ne agnoskis kiel kuncivitanojn, sed kiel subulojn. Tio estis la sola koincido, laŭ mia eltrovo, kiun Fransisko Franko. Franko estis hispanisma kaj aŭtoritatisma. Sed li ne estis socialisma. Pro tio li ne povis esti faŝisma. Do necesas esti granda ignoranto por diri, ke Franko estis faŝisto. Eble ĉiu *bona* maldekstrulo (tio estas, socialisto aŭ komunisto) konsideras desktrulo ĉiujn homojn, kies postuloj kuŝas dekstre de sia propra ideologio, kion ajn tio estas. Aŭ eĉ, ni koncedu, ĉiun ajn, kies sopiroj estu malpli *progresemaj* ol siaj, tiuj de *veraj maldekstruloj*. Sed vidu, ke eĉ tiusence, homoj, kiuj sopiras al individuaj liberoj por homaro estas dekstre, multe pli dekstren el faŝistoj kaj komunistoj

kaj socialistoj, kaj tamen laŭdifine ne estas aŭtoritateskaj, sed tute male.

Ni vidu, ke kiam socialismo kaj komunismo estis klandestinaj movadoj en Hispanio, ties anoj ĉiam postulis liberecon pri esprimo kaj penso. Pensiga estas la afero, ke nun, kaj ankaŭ je tiuj du momentoj, kiam socialistoj regis en Hispanio, ili kontraŭis akre la liberecon pensi kaj liberesprimi. Oni ne forgesu kial oni arestis kaj torturis kaj murdis homojn dum la respublikaj kaj dummilitaj jaroj pro tio, ke oni estis dikredanto aŭ havis multe da mono. Sed oni ankaŭ vidu, ke en nuna Hispanio oni ne kutime kuraĝas diri, ke oni estas dekstra, ke oni ne kondamnas la reĝimon de Franko, ke oni trovas kialojn por la ribelo de la generaloj, kaj tiel plu. Laste mi atentigis kelkajn amikojn, ke inter la povoj de la Reĝo de Hispanio estas la absoluta rego de la armeo, ĉar la sola Generalo Kapitano de la armeo estas li. Kaj ke la ĉefa devo de la hispana armeo, laŭ la reganta konstitucio de 1978, estas defendi la *unuecon de la patrio,* tio estas, Hispanio. Sekve, se oni intencas apartigi parton de Hispanio en sendependan landon, nome Vaskion aŭ Katalunion, la devo de la armeo kaj evidente de la Reĝo de Hispanio, estas puĉi armee, fermi la parlamentojn de Hispanio kaj de la diversaj aŭtonomaj komunumoj, aparte tiun de la sendependiĝa parto de Hispanio, kaj organizi novan balotadon por elekti registaron kaj parlamenton. Tiun ideon oni ne kontraŭis, sed oni rekte asertis insulte, ke mi estas faŝisto kaj puĉisto. Tio estas tre malriĉa intelekta kapablo, kaj ĝi nur pruvas, ke mi devas pli zorge elekti amikojn kaj kundiskutantojn, ĉar la kerna afero ne estis eĉ tuŝita: ĉu mi pravis, ĉu mi ne pravis, ĉu la hispana konstitucio diras tion, ĉu ne, sed nur tion, ke ili ne ŝatis tiun ideon. Kaj tion dirante, ili asertas, ke libereco pri opinio estas nur libereco opinii same kiel ili. Same naŭzas la spektaklo de ministroj hispanaj, kiam oni demandas ilin en parlamento, kaj ili respondas nur per insultoj aŭ dirante, ke la antaŭa registaro faris aferojn eĉ pli malbone. La moderna hispano tute prifajfas pri tio, kion la antaŭaj registaroj de Hispanio, de tiu de José María Aznar ĝis tiu de Ĉindasvinto aŭ Recesvinto, eĉ Leovigildo, faris. La moderna hispano estas multe pli interesita pri tio, kion la aktuala registaro de Hispanio faras, aŭ intencas fari. Leĝigi la geedziĝon de samseksemuloj povas esti kurioza afero, sed multe pli interesa estas la sekvo plifaciliga de vivo por hispano hodiaŭa. Konstruo de malmultekostaj hejmoj, ekzemple, aŭ malplialtigo de la prezo de manĝaĵoj ĉiutagaj, ekzemple, estas multe pli interesaj. Aŭ, almenaŭ, klarigo de la motivoj kial atingi tiujn du antaŭbalotadaj promesoj ne ebliĝis. Povas esti, ke ekzistas objektivaj kialoj, kiuj malebligis ilin, sed moderna hispano tute ne konas ilin.

Partioj hispanaj hodiaŭaj jam kaptis demokration for de komunaj hispanoj, kaj ili ankoraŭ ne klarigis sufiĉe klare kial aŭ kiumaniere ili laboras cele al plibonfartigo de civitanoj. Ĉu ili nin ne konsideras tiel? Ĉu vere ni estas nur subuloj, kvazaŭ ni ankoraŭ vivus en mezepoko? Mi timas, ke tiurilate tute ne ekzistas diferenco inter dekstro kaj maldekstro..., kaj rilate al nia bonfarto, ambaŭ grandaj partioj, kaj eĉ multe pli la malgrandaj partioj de Hispanio, apartenas al la plej malbela flanko de dekstro. Eĉ se ili havas la pompan nomon *komunisma* (kiel PCE) aŭ *socialisma* (kiel PSOE), kaj la eĉ pli respektinda slogano *libera* aŭ *liberiga* aŭ *popola*, kiel PP.

# LA 18ª Kongreso de Esperanto de la VEFkM

La pasintan 28an de aprilo okazis en "El Casal Jove" de Burriana la XVIIIª Kongreso de Valencia Federacio kaj Murcio, kie partoprenis trideko da esperantistoj el Alakanto, Casteljono, Ĉesto, Murcio kaj Valencio.

Bonvenigis nin, nome de la urbestraro de Burriana, la skabenoj pri kulturo kaj juneco. Bonetose ni kunvenis, ni havis prelegojn pri "Kosmobiologio" fare de Francisco García kaj pri "Ekologio kaj Esperanto" fare de Pacual Pont, oni malfermis esperantan filatelian ekspozicion fare de Rafael Peris kaj Rodolfo Canet, oni regalis nin per la kantoj de Sonia Atenea kaj Lugh Palons, ni manĝis gigantan paeljon farita de geedzoj Conejero, babilis kaj finfine adiaŭis unu la aliajn ĝis la venonta jaro.

Dum la Ĝenerala Asembleo: Oni parolis pri la diversaj esperantaj aktivaĵoj de la grupoj. Ĉar la administracio nun postulas de ni la plenumigon de diversaj dokumentoj kaj la korektado de aliajn kiuj jam oni sendis, oni pridiskutis la aferon kaj voĉdone oni konkludis ne reoficialigi la Federacion de oficialigitaj Grupoj de Esperanto. Oni proponis la nomon "Renkontiĝo" anstataŭ "Kongreso" por tiuj kunvenoj.

Por la venonta jaro, la Valencian-Murcian renkontiĝon oni okazigos, se eblas, en Murcio.

*José Miguel Bernabéu*

# Kion mi pensos

Kion mi pensos, kiam mi estos mortanta,
, —se nur mi tiam povos ion pensi?

Ĉu mi pensos pri tio, ke mi malbone uzis la vivon, ke mi ĝin tradormis, transonĝis, ke mi ne sciis ĝui ĝiajn donacojn?

«Kiel? Tio jam estas la morto? Tiel rapide? Ne eble! Mi ja ankoraŭ nenion sukcesis fari... Mi nur prepariĝis por ion fari!»

Ĉu mi rememoros la tempojn pasintajn, haltos per la penso ĉe la malmultaj, feliĉe travivitaj momentoj, ĉe karaj figuroj kaj personoj?

Ĉu stariĝos antaŭ mia memoro miaj malbonaj faroj, kaj mia animo sentos la bruligan doloron de la malfrua pento?


Ĉu mi pensos pri tio, kio atendas min post la tombo... Ĉu entute io atendas min tie?


Ne..., ŝajnas al mi, ke mi penos ne pensi kaj devigos min okupiĝi per ia bagatelo, por deturni mian atenton de la minaca mallumo, de la nigra senfundaĵo antaŭ mi.

Jam en mia ĉeesto mortanto plendis, ke oni ne permesas al li manĝi nuksojn..., kaj nur tie, en la profundo de liaj malklaraj okuloj, ŝanceliĝis kaj tremis ion, kvazaŭ rompita flugilo de morte vundita birdo.

*Ivano Turgeneo*
*(Tradukite de Krešimir Klein)*

http://www.gazetoteko.eu/sh/index.html



BORIS KOLKER
VOJAĜO EN
ESPERANTO-LANDO
GENERALTURIST
ZAGREB CROATIA
UEA


BEKKURSO
NOVA EKZERCARO PRI
SUFIKSOJ KAJ PREFIKSOJ
L 2100 EKZERCEROJ KUN RESPONDOJ
TRADICIAJ KURSOJ, RETLERNANTOJ, TESTADO, KAJ BEKKU
DENNIS EDWARD KEEFE
COPYRIGHT 2007

# Lernu Esperanton per la BEK-Kurso!

Dum la lasta Konferenco de ILEI en Ranzan, Japanio, mi ekkonis usonanon Edward Keefe, instruisto pri la angla, sed kiu profitas sian vastan sperton en tiu kampo favore al Esperanto. Tiucele li komponis alternativan kaj grande fruktodonan kurson por ni ĉiuj, kiuj ne ĉiam havas tiom multe da tempo por lerni nian plejŝatatan lingvon. Laŭ li, la celo de la libro estas *helpi al gelernantoj pliprofundigi siajn konojn pri esperantaj vortoj, ĉefe pri sufiksoj kaj prefiksoj*. Li prezentas pli ol 2100 ekzerceroj laŭ la tuta libro, kaj 48 vortstudoj kun ekzercoj, kaj 40 *bekumaĵoj*, aŭ ekzercoj, kiuj revidas kaj kontrolas ĉiujn antaŭe lernitajn prefiksojn kaj sufiksojn. Tiujn bekumaĵojn oni povas aŭdi en inkluzivita cd-romo. La gramatiko estas tre simpla, je baza nivelo, tiel ke oni povas tralabori la tutan libron eĉ se sia lingva kompetenco ne estas tre alta. Sed la vortprovizo kreskas dum li aŭ ŝi tion faras, kompreneble.


La libro konvenas kaj al memstudanto kaj al instruisto, ĉar tiu ĉi lasta povas eltiri koncernajn ekzercojn por siaj propraj celoj en siaj klasoj kun siaj gelernantoj. Notinde estas, ke oni ricevas interretan subtenon ĉe http://www.bekkurso.info, kaj ke la libro kostas nur dek eŭrojn!



Dennis Keefe

# Vojaĝu en Esperanto-Landon!

Alitipan koncepton pri Esperanto instruado kaj memlernado ni trovas en la verko de Boris Kolker, kontraste al la simpleco de la libro de Keefe, Kolker uzis buntan paĝojn por fari pli altiran la vojaĝon de samideanoj en utopian landon de Esperanto. Subtitolo estas tre klariga: *Perfektiga Kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la esperanta kulturo.* Laŭ 26 *lecionoj* oni vidas interesajn dokumentojn, rakontojn, poemojn, komentarojn interesajn okaze de la aliaj eroj, kaj ankaŭ lingvajn ekzercojn, sen kiuj la verko ne estus kurso. Tamen, la fotoj kaj desegnaĵoj enhavitaj estas tiom altkvalitaj, ke indas legi la libron eĉ se nur pro la plezuro legi niajn plej bonajn plumojn, kiel Istvan Nemere, Raymond Schwartz, Julio Baghy, Ŝpomenka Ŝtimeĉ, John Wells kaj Zamenhof mem.



Boris Kolker

La libron oni povas ricevi de UEA mem kontraŭ 18 eŭroj.

Sur paĝoj 12-a kaj 13-a oni povas vidi la kovertojn de la libroj recenzitaj ĉi tie. Rodolfo Canet jam atentigis min pri la libro antaŭ kelkaj jaroj, sed pro manko da oportuneco mi ne antaŭe povis recenzi ĝin en niaj paĝoj.

# STUDSESIO EN BYDGOSZCZ

Dum la semajno el la 24a al la 26a de marto, okazas en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo el la pola urbo Bydgoszcz, stud- kaj ekzamensesio de la lernojaro 2006/ 2007.

Kiel oni scias, la oficiala lingvo de tiu lernejo estas Esperanto. En tiu lingvo okazas la plej granda parto de la tuta instruado.La sesion partoprenas la gestudentoj (ĉirkaŭ cent), el multaj diversaj landoj, kiel Albanio, Uzbekistano, Japanio, Ĉinio, Brazilo, Senegalio, Kamerunio, Tanzanio, Mongolio, Zimbavo, Kenio, Pollando, ktp.La profesoroj kaj prelegantoj estas ankaŭ el diversaj landoj, kiel Bojidar Leonov (Bulgario), Mirka Korniluk (Pollando)Marcel Delforge (Belgio), Mara Timermane (Latvio),Andrzej Korniluk (Pollando), Aŭgusto Casquero (Hispanio), Regina Grzebowska (Litovio), Remigiusz Mielczarek (Pollando), Xu Xiao Nan (Ĉinio), Abraham Langoume (Senegalio).Fine de la sesio okazos la ekzameno, en kiu la gelernantoj devas prezenti kaj defendi siajn diplomverkoj, verkitaj kaj defenditaj tute en Esperanto. La gestudentoj de la tria jaro bakalaŭriĝas, kaj atingas la ŝtatan polan diplomon.



*Augusto Casquero*

# La faraono

## *XXª Ĉapitro*

Ĉirkaŭ la naŭa horo vespere Phut forlasis la gastejon «Sub Ŝipo» akompanata de Negro portanta torĉon. Duonon da horo antaŭe Asarhadon sendis en la straton de l' Tomboj konfidindan homon, ordonante al li atente observi: ĉu la Harranano ne forlasos sekrete la domon «Sub Verda Stelo» kaj se li faros tion, kien li iros?

Alia sendito de Asarhadon iris post Phut en difinita distanco: sur la mallarĝaj stratoj li kaŝis sin post la domoj, sur la larĝaj li ŝajnigis ebriecon.



La stratoj jam estis malplenaj, la portistoj kaj vendistoj jam dormis. Lumo estis nur en la loĝejoj de l' metiistoj, aŭ ĉe riĉaj homoj, kiuj festenis sur plataj tegmentoj. En diversaj domoj de la urbo sonis harpoj kaj flutoj, kantoj, ridoj, frapado de marteloj, grincado de segiloj, iafoje krioj de ebriuloj aŭ vokoj pri helpo. La stratoj, tra kiuj iris Phut kaj la Negro, estis plejparte mallarĝaj, kurbaj, plenaj de kavoj. Ju pli proksime ili estis de la celo de l' vojaĝo, des pli malaltaj estis la domoj, des pli multenombraj la ĝardenoj, aŭ pli ĝuste la palmujoj kaj figarboj kaj la mizeraj akacioj, kiuj etendis siajn kapojn trans la murojn, kvazaŭ intencante forkuri.

Sur la strato de l' Tomboj la aspekto subite ŝanĝiĝis. Anstataŭ domoj - vastaj ĝardenoj, kaj en ili - elegantaj palacoj. Antaŭ unu el la pordegoj la Negro haltis kaj estingis la torĉon.

- Ĉi tie estas la «Verda Stelo» - diris li kaj salutinte Phuton reiris hejmen.

La Harranano frapis la pordon. Post momento aperis la pordisto. Li atente rigardis la veninton kaj diris:

- Anael, Sahiel...

- Amabiel, Abalidot - respondis la Harranano.

- Saluton al vi - diris la pordisto kaj rapide malfermis la pordegon.

Farinte kelkdekon da paŝoj inter la arboj, Phut venis en vestiblon de malgranda palaco, kie akceptis lin la pastrino, kiun ni jam konas. En mallumo staris homo tiel simila al Phut, ke la veninto ne povis kaŝi la miron.

- Li anstataŭos vin en la okuloj de tiuj, kiuj spionas vin - diris la pastrino kun rideto.

La homo, alivestita kiel la Harranano, metis sur sian kapon kronon de rozoj kaj akompanata de la pastrino iris sur la unuan etaĝon, kie baldaŭ eksonis fluto kaj frapado de l' pokaloj. Phuton du pastroj de malalta rango kondukis en vaporbanejon en la ĝardeno. Tie, baninte lin kaj kombinte liajn harojn, ili surmetis al li blankajn vestojn.

El la banejo ĉiuj tri iris inter la arboj: pasinte kelke da ĝardenoj, ili fine troviĝis sur malplena placo.

- Tie - diris al Phut unu el la pastroj - estas la antikvaj tomboj, tie la urbo, kaj ĉi tie la templo. Iru kien vi volas, montru la saĝo al vi la vojon, kaj la sanktaj vortoj defendu vin de la danĝeroj.

La du pastroj revenis en la ĝardenon, kaj Phut restis sola. La senluna nokto estis

sufiĉe luma. Malproksime, vualita de nebulo, briletis Nilo, supre brilis la sep steloj de la Granda Ursino. Super la kapo de l' vojaĝanto brulis Oriono, kaj super la nigraj pilonoj Siriuso.

- Ĉe ni la steloj lumas pli forte - pensis Phut.

Li komencis murmureti preĝon en nekonata lingvo kaj sin direktis al la templo.

Kiam li foriris kelkdekon da paŝoj, el ĝardeno elrigardis iu homo kaj spionis la vojaĝanton. Sed preskaŭ en la sama momento falis tiel densa nebulo, ke sur la placo, ekster la tegmentoj de l' templo, oni povis vidi nenion.

Post iom da tempo la Harranano renkontis muron. Li ekrigardis la ĉielon kaj komencis iri al la okcidento. Ĉiumomente traflugis super li noktaj birdoj kaj grandaj vespertoj. La nebulo fariĝis tiel densa, ke li devis palpi la muron, por ne perdi ĝin. La migrado daŭris jam sufiĉe longe, kiam subite Phut troviĝis antaŭ malalta pordeto, kun multenombraj bronzaj najloj. Li kalkulis ilin de la dekstra flanko, komencante de la supro, unujn li forte premis, aliajn turnis.

Kiam tiamaniere li tuŝis la lastan najlon malsupran, la pordo mallaŭte malfermiĝis. Phut iris antaŭen kelke da paŝoj kaj troviĝis en malvasta niĉo, kie regis plena mallumo.



Li komencis esplori singarde la plankon per la piedo, ĝis fine li renkontis kvazaŭ randon de puto, el kiu blovis malvarmo. Li sidiĝis tie kaj sentime deglitis en la profundegaĵon, kvankam li estis unuafoje en ĉi tiu loko kaj en ĉi tiu lando.

Sed la puto ne estis profunda. Phut metis la piedojn sur la deklivan plankon kaj tra la larĝa koridoro komencis iri malsupren, kun tia certeco, kvazaŭ li konus de longe la vojon.

En la fino de la koridoro estis pordo. La veninto trovis palpe frapilon kaj ekfrapis trifoje. Responde eksonis voĉo, venanta oni ne scias de kie.

- Vi, kiu en nokta horo rompas la trankvilon de la sankta loko, ĉu vi havas la rajton eniri ĉi tien?

- Mi estis maljusta nek por viro, nek por virino, nek por infano... Miajn manojn ne makulis sango... Mi ne manĝis malpurajn nutraĵojn... Mi ne prenis fremdan propraĵon... Mi ne mensogis kaj mi ne malkaŝis

la grandan misteron... - trankvile respondis la Harranano.

- Ĉu vi estas tiu, kiun oni atendas, aŭ tiu, kiun vi ŝajnigas? - demandis la voĉo post momento.

- Mi estas tiu, kiu devis veni de la fratoj de Oriento: sed la dua nomo estas ankaŭ mia nomo, kaj en la norda urbo mi posedas teron kaj domon, kiel mi diris al la fremduloj - respondis la Harranano.

La pordo malfermiĝis, kaj Phut eniris en vastan kelon, kiun lumigis malgranda lampo, brulanta sur tablo, antaŭ purpura kurteno. Sur la kurteno estis brodita per oro flugila globo kun du serpentoj.

En angulo staris egipta pastro en blanka vesto.

- Vi, kiu eniris ĉi tien - diris la pastro, montrante Phuton - ĉu vi scias, kion rakontas ĉi tiu signo sur la kurteno?

- La globo - respondis la veninto - estas bildo de la mondo, kiun ni loĝas, kaj la flugiloj montras, ke tiu mondo flugas en la spaco, kiel aglo.

- Kaj la serpentoj?... - demandis la pastro.

- Du serpentoj rememorigas al la saĝulo, ke tiu, kiu perfidus la grandan misteron, mortus dufoje - korpe kaj anime.

- Se vere vi estas Beroes (la pastro klinis la kapon) la granda ĥaldea profeto (li ree klinis la kapon), por kiu ne ekzistas misteroj sur la tero kaj sur la ĉielo, bonvolu diri al via servisto: kiu stelo estas plej stranga?

- Stranga estas Hor-set [*La planedo Jupitero*] , kiu ĉirkaŭiras la ĉielon dum dek du jaroj, ĉar ĉirkaŭ ĝi rondiras kvar pli malgrandaj steloj. Sed la plej stranga estas Horka [*La planedo Saturno*] , kiu ĉirkaŭiras la ĉielon dum tridek jaroj. ?i havas ne nur stelojn ĝin obeantajn, sed ankaŭ grandegan ringon, kiu iafoje malaperas.

Aŭdinte tion, la egipta pastro falis teren antaŭ la ĥaldea. Poste li donis al li purpuran skarpon kaj vualon el muslino kaj montris al li, kie estas la incensoj kaj profunde sin klinante, forlasis la kavernon.

Beroes restis sola. Li metis la skarpon sur la dekstran ŝultron, kovris la vizaĝon per la vualo kaj preninte oran kuleron, li ŝutis en ĝin incenson, kiun li ekbruligis ĉe la lampo antaŭ la kurteno. Murmurante li turnis sin trifoje ĉirkaŭe, kaj la bonodorfumo formis ĉirkaŭ li kvazaŭ trioblan ringon.


Dume en la malplena kaverno ekregis stranga malkvieto. Ŝajnis, ke la plafono leviĝas kaj ke disiĝas la muroj. La purpura kurteno sur la altaro ŝanceliĝis, kvazaŭ movata per kaŝitaj manoj. La aero komencis ondi, kvazaŭ skuata de traflugantaj nevideblaj birdoj.

La Ĥaldeano disigis la veston sur la brusto kaj eltiris oran medalon, kovritan de misteraj signoj. La kaverno ektremis, la sankta kurteno forte skuiĝis kaj en diversaj punktoj aperis flametoj.

Tiam la mago levis la manojn supren kaj komencis paroli:

- Patro ĉiela, bona kaj kompatema, purigu mian animon... Sendu sur la neindan serviston Viajn benojn kaj etendu Vian ĉiopovan brakon kontraŭ la ribelaj spiritoj, por ke mi povu montri Vian potencon...

Jen estas la signo, kiun mi tuŝas en Via ĉeesto... Jen estas mi - mi apogita sur la



Dia potenco, mi antaŭvidanta kaj sentima... Jen mi potenca alvokas Vin... Venu ĉi tien, obeemaj, en la nomo de Aye, Saraye, Aye, Saraye....

En la sama momento de diversaj flankoj eksonis kvazaŭ malproksimaj trumpetoj. Apud la lampo preterflugis birdo, poste flavruĝa vesto, fine kronita koko, kiu haltis sur la tablo antaŭ la kurteno.

La Ĥaldeano daŭrigis:

- En la nomo de ĉiopova kaj eterna Dio... Amorul, Taneĥa, Rabur, Latisten....

La malproksimaj trumpetoj eksonis duan fojon.

- En la nomo de la vera kaj eterne vivanta Eloy, Arhima, Rabur, mi petegas vin kaj alvokas... Per la nomo de la stelo, kiu estas la suno, per ĉi tiu ĝia signo, per la glora kaj terura nomo de la vivanta Dio...

Ree ekludis la trumpetoj kaj subite eksilentis. Antaŭ la altaro aperis kronita fantomo, sidanta sur leono, kun spektro en la mano.

- Beroes! Beroes!... - ekkriis la fantomo per sufokita voĉo - por kio vi elvokas min?

- Mi volas, ke miaj fratoj en ĉi tiu templo akceptu min per sincera koro kaj klinu la orelojn al la vortoj, kiujn mi alportas al ili de la fratoj de Babilono - respondis la Ĥaldeano.

- Tiel estu - diris la fantomo kaj malaperis.

La Ĥaldeano restis senmova, kvazaŭ statuo, kun la kapo ĵetita posten, kun la manoj etenditaj supren. Li staris tiel pli ol duonon da horo, en sintenado tute neebla por ordinara homo.

Dume foriĝis peco de la muro de l' kaverno; kaj eniris tri egiptaj pastroj. Vidante la Ĥaldeanon, kiu ŝajnis kuŝi en la aero, kvazaŭ subtenata de nevidebla apogilo, la pastroj mire ekrigardis unu la alian. La plej maljuna diris:

- Iam estis tiaj inter ni, sed nun neniu scias ĉi tion.

Ili iris ĉirkaŭ li de ĉiuj flankoj, tuŝis liajn rigidajn membrojn kaj kun maltrankvilo rigardis lian vizaĝon, flavan kaj sensangan, kadavran.

- Ĉu li mortis?... - demandis la plej juna.

Post ĉi tiuj vortoj, la korpo de la Ĥaldeano, kurbita posten, ree stariĝis vertikale, kaj malleviĝis la etenditaj manoj. Li ekĝemis, frotis la okulojn, kvazaŭ homo vekita, ekrigardis la venintojn kaj post momento diris:

- Vi - li turnis sin al la plej aĝa - vi estas Mefres, la ĉefepiskopo de la templo de Ptah en Memfiso... Vi estas Herhor, la ĉefepiskopo de Amon en Teboj, la plej potenca homo en la regno, post la reĝo... Vi - li montris la plej junan - vi estas Pentuer, la dua profeto en la templo de Amon kaj la konsilanto de Herhor.

- Kaj vi sendube estas Beroes, la granda pastro kaj saĝulo babilona, kies venon oni anoncis al ni antaŭ unu jaro - respondis Mefres.

- Vi diris la veron - reparolis la Ĥaldeano.

Li ĉirkaŭprenis ilin unu post la alia, kaj ili klinis antaŭ li la kapojn.

- Mi alportas al vi grandajn vortojn de nia komuna patrujo, kiu estas la saĝo - daŭrigis Beroes. Bonvolu aŭskulti ilin kaj agu, kiel konvenas. Laŭ signo de Herhor, Pentuer iris en la fundon de la kaverno kaj alportis tri seĝojn por la pli aĝaj kaj malaltan tabureton por si mem. Li sidiĝis proksime de la lampo kaj eltiris el sub la vesto malgrandan stilon kaj malgrandan tabuleton, kovritan per vakso.

Kiam ĉiuj tri okupis la seĝojn, Beroes komencis:

- Al vi, Mefres, parolas la plej alta kolegio de l' pastroj en Babilono: La sankta pastraro en Egipto falas. Multaj el ili amasigas monon kaj virinojn kaj pasigas la vivon en ĝuoj. La saĝo estas malŝatata. Vi estras nek la mondon nevideblan, nek eĉ la proprajn animojn. Kelkaj perdis la superan kredon, kaj por viaj pupiloj kovrita estas la estonteco. Kaj plej malbone estas, ke multaj pastroj ekiris la vojon de l' mensogo kaj per lertaj artifikoj trompas la simplulojn.

Jen kion diras la plej alta kolegio: Se vi volas reveni sur la bonan vojon, Beroes restos kun vi kelke da jaroj kaj per la fajrero, alportita de la granda altaro de Babilono ekflamigos la veran lumon sur la bordoj de Nilo.

- Ĉio estas, kiel vi diras - respondis malgaje Mefres. - Restu do kun ni kelke da jaroj, por ke la junularo rememoru vian saĝon.

- Kaj nun al vi, Herhor, la vortoj de la plej alta kolegio.... Herhor klinis la kapon.

- Pro la malŝato de la grandaj misteroj viaj pastroj ne rimarkis, ke venas malbonaj jaroj por Egipto. Minacas vin internaj katastrofoj, kiujn povas forigi nur la virto kaj saĝo. Sed plej malbone estas, ke se dum la dek sekvontaj jaroj vi komencos militon kontraŭ Asirio, ĝiaj armeoj frakasos la viajn, venos al Nilo kaj detruos ĉion, kio ekzistas ĉi tie de jarcentoj.

Tiel malfavoraj steloj, kiaj pendas hodiaŭ super Egipto, kolektiĝis unuan fojon dum la XIV-a dinastio, kiam vian landon invadis kaj rabis Hiksoj. Trian fojon tio okazos post kvincent aŭ sescent jaroj de la flanko de Asirio kaj de la popolo Paras, kiu loĝas oriente de Ĥaldeo...

La pastroj aŭskultis teruritaj. Herhor estis pala, Pentuer ellasis la tabuleton el la mano. Mefres prenis de l' brusto amuleton kaj komencis preĝi per sekaj lipoj.

- Gardu vin kontraŭ Asirio - daŭrigis la Ĥaldeano - ĉar hodiaŭ estas ĝia horo. Kruela popolo!... Ili malŝatas la laboron kaj vivas per la milito. Ili palisumas la venkitojn aŭ deŝiras de ili vivantaj la haŭton, detruas la urbojn, sklavigas kaj forkondukas la popolon. Ĉasi sovaĝajn bestojn estas por ili ripozo; arkpafi militkaptitojn aŭ elŝiri al ili la okulojn estas por ili plezuro. Ili ruinigas la templojn, kaj la diajn vazojn ili uzas por siaj festenoj. La pastrojn kaj saĝulojn ili faras siaj arlekenoj. La haŭtoj de vivantaj homoj estas ornamo de iliaj domoj kaj la

sangantaj kapoj de malamikoj estas ornamo de iliaj tabloj.

Kiam Beroes eksilentis, la respektinda Mefres diris:

- Granda profeto, vi ĵetis timon sur nian animon kaj ne montras savon. Tio povas esti kaj certe estas tiel, se vi diras, ke la sorto dum iom da tempo estos malfavora por ni; sed kiel tion eviti? Estas en Nilo danĝeraj lokoj, kie neniu ŝipo povas sin savi; kaj tial la saĝo de la remistoj evitas la minacajn akvoturnojn. Samaj estas la malfeliĉoj de l' popoloj. La popolo estas ŝipo kaj la tempo estas rivero, kiun de tempo al tempo ondigas ventego. Kaj se eta fiŝista konko scias eviti katastrofon, kial en analogiaj cirkonstancoj milionoj da homoj ne povus eviti la pereon?

- Saĝaj estas viaj vortoj - diris Beroes - sed nur parte mi scios respondi ilin.

- Ĉu do vi ne scias ĉion, kio okazos? - demandis Herhor.

- Ne demandu pri tio, kion mi scias, sed kion mi ne povas diri. Plej grava afero por vi estas konservi dekjaran pacon kun Asirio, kaj tio estas en la limoj de via povo.

Asirio ankoraŭ vin timas, ne scias pri la malfavora sorto, kiu minacas vin kaj volas komenci militon kontraŭ la popoloj de Nordo kaj Oriento, kiuj loĝas proksime de la maro. Hodiaŭ do vi povus fari aliancon kun ili...

- Je kiaj kondiĉoj - interrompis Herhor.

- Je bonegaj. Asirio cedos al vi la teron de Izraelo ĝis la urbo Okka kaj la landon Edom ĝis la urbo Elath. Tiamaniere viaj limoj vastiĝos je dektaga marŝo al la nordo kaj oriento.

- Kaj Fenicio?... - demandis Herhor.

- Gardu vin de la tento!... - ekkriis Beroes. - Se hodiaŭ la faraono etendus la manon por preni Fenicion, post unu monato la asiriaj armeoj, destinitaj por la nordo kaj oriento, sin turnus kontraŭ vi kaj pli frue ol post unu jaro iliaj ĉevaloj sin banus en Nilo.

- Sed Egipto ne povas forlasi sian influon super Fenicio! - interrompis Herhor kun eksplodo.

- Se ĝi tion ne farus, ĝi mem preparus sian pereon - diris Beroes. - Cetere mi ripetas al vi la vortojn de la plej alta kolegio. «Diru al Egipto» ordonis al mi la fratoj de Babilono «ke ĝi sin alpremu por dek jaroj al la tero kiel perdriko, ĉar ĝin spionas la vulturo de la malbona sorto. Diru, ke ni, Ĥaldeanoj, malamas Asirianojn pli forte ol Egipto, ĉar ni portas la pezon de ilia potenco; tamen ni konsilas al Egipto konservi la pacon kun ĉi tiu sangavida popolo. Dek jaroj pasos rapide, kaj post ili vi povos ne nur reakiri viajn antaŭajn posedaĵojn, sed ankaŭ savi nin.» -

- Tio estas vera! - diris Mefres.

- Konsideru nur - daŭrigis Beroes. - Se Asirio militos kontraŭ vi, ĝi entiros ankaŭ Babilonon, por kiu la milito estas abomena, ĝi elĉerpos niajn riĉaĵojn kaj haltigos la laboron de la scienco. Eĉ se vi ne estos venkitaj, via lando estos ruinigita por multaj jaroj kaj perdos ne nur multe da homoj, sed ankaŭ tiujn fruktodonajn terojn, kiujn sen viaj penoj la sablo kovrus en la daŭro de unu jaro.

- Tion ni komprenas - intermetis Herhor - kaj tial ni ne intencas ataki Asirion. Sed Fenicio...

- Ĉu malutilas vin - diris Beroes - ke la asiria rabisto premegos la fenician ŝteliston? Niaj kaj viaj komercistoj nur gajnos per tio. Kaj se vi volas posedi Fenicianojn, permesu al ili ekloĝadi sur viaj bordoj. Mi estas certa, ke la plej riĉaj kaj plej lertaj forkuros de la asiria jugo.

- Kio fariĝus nia ŝiparo, se Asirio ekloĝus en Fenicio? - demandis Herhor.

- Ĉi tiu ŝiparo en la realeco ne estas via, sed fenicia - respondis la Ĥaldeano. - Kiam ekmankos al vi tiraj kaj sidonaj ŝipoj, vi komencos konstrui proprajn kaj ekzerci Egiptanojn en la marveturado. Se vi havos inteligentecon kaj energion, vi forŝiros de Fenicianoj la komercon en la tuta okcidento...

Herhor eksvingis la manon.

- Mi diris, kion oni ordonis al mi - daŭrigis Beroes - kaj vi faru, kion vi volas. Sed memoru, ke pendas super vi dek fatalaj jaroj.

- Ŝajnas al mi, sankta viro, - intermetis Pentuer - ke vi parolis pri internaj katastrofoj, kiuj minacas Egipton en la estonteco. Kio okazos? Se vi bonvolos respondi al via servisto.

- Pri tio ne demandu min. Vi devas pli bone scii tion, ol mi, homo fremda. La antaŭzorgemo malkovros al vi la malsanon kaj la sperto montrus la rimedon.

- La popolo estas terure premegata de la grandaj! - murmuretis Pentuer.

- La pieco malaperas!... - diris Mefres.

- Ekzistas multe da homoj, kiuj sopiras al ekstera milito - aldonis Herhor. - Kaj mi vidas jam de longe, ke ni ne povas konduki ĝin. Eble post dek jaroj...

- Vi do faros traktaton kun Asirio? - demandis la Ĥaldeano.

- Amon, kiu konas mian koron - diris Herhor - scias, kiel abomena estas por mi tia traktato... Antaŭ ne longe ankoraŭ, la mizeraj Asirianoj pagis al ni tributojn!... Sed se vi, sankta patro, kaj la plej alta kolegio diras, ke la sorto estas kontraŭ ni, ni devas fari la traktaton....

- Vere, ni devas... - aldonis Mefres.

- En tia okazo sciigu al la kolegio en Babilono vian decidon, kaj ili faros, ke la reĝo Assar sendos al vi siajn rajtigitojn. Konfidu al mi, ke ĉi tiu traktato estas tre profita: sen milito vi pligrandigas viajn posedaĵojn!... Cetere, longe meditis pri ĝi nia sankta kolegio.

- Pluvu sur vin ĉiuj benoj: riĉaĵoj, potenco kaj saĝo! - diris Mefres. - Jes, oni devas relevi nian pastraron, kaj vi, sankta viro, Beroes, helpos nin.

- Antaŭ ĉio oni devas helpi la mizeran popolon - intermetis Pentuer.

- La pastroj... la popolo!... - parolis Herhor kvazaŭ al si mem. - Antaŭ ĉio oni devas deteni tiujn, kiuj deziras la militon... Vere estas, ke lia sankteco estas kun ni, kaj ŝajnas al mi, ke mi akiris iom da influo je la koro de la nobla kronprinco (li vivu eterne!). Sed Nitager, kiu bezonas militon, kiel la fiŝo akvon... Sed la estroj de la dungataj armeoj, kiuj nur dum la milito ion valoras ĉe ni... Sed nia aristokratio, kiu pensas, ke la milito pagos la feniciajn ŝuldojn, kaj al ili alportos riĉaĵojn...

- Dume la kamparanoj falas sub la ŝarĝo de la laboroj, kaj la ŝtataj laboristoj ribelas pro la rabemo de la estroj - intermetis Pentuer.

- Ĉi tiu ĉiam revenas al sia ideo! - diris la meditanta Herhor. - Vi, Pentuer, pensu pri la kamparanoj kaj laboristoj; vi, Mefres, pri la pastroj. Mi ne scias, kion vi sukcesos fari, sed mi - mi ĵuras, ke se mia propra filo puŝus Egipton al la milito, mi rompus la propran filon...




- Faru tiel - diris la Ĥaldeano. - Cetere, kiu volas, konduku militon, sed nur ne tie, kie li povas renkonti Asirion.

Finita estis la kunsido. Beroes metis la skarpon sur la ŝultron kaj la kovrilon sur la vizaĝon; Mefres kaj Herhor stariĝis ĉe ambaŭ liaj flankoj, kaj post ili Pentuer, ĉiuj turnitaj al la altaro.

Kiam Beroes, krucinte la manojn sur la brusto, murmuretis, en la kaverno ree komenciĝis malkvieto. Oni aŭdis kvazaŭ malproksiman tumulton, kiu mirigis la asistantojn. Tiam la mago ekparolis laŭte:

- Baralanensis, Baldaĥiensis, Panmaĥiae, mi alvokas vin esti atestantoj de nia interkonsento kaj helpi niajn intencojn...

Eksonis trumpetoj tiel klare, ke Mefres sin klinis al la tero, Herhor ĉirkaŭrigardis mirigita, kaj Pentuer ekgenuis, komencis tremi kaj kovris siajn orelojn.

La purpura kurteno sur la altaro ŝanceliĝis, kaj ĝiaj faldoj havis tian formon, kvazaŭ de tie volus eliri homo.

- Estu atestantoj - kriis Beroes per aliigita voĉo - potencoj ĉielaj kaj inferaj! Kaj, kiu rompos la interkonsenton, estu malbenita...

- Malbenita!... - ripetis iu voĉo.

- Kaj detruita...

- Kaj detruita...

- En ĉi tiu videbla kaj en la alia nevidebla vivo. Per la sankta nomo de Jehovo, ĉe kies sono la tero tremas, la maro refluas, la fajro estingiĝas, la elementoj de la naturo malkomponiĝas.

En la kaverno ekregis vera fulmotondro. Sonoj de trumpetoj miksiĝis kun bruo de malproksimaj tondroj. La kurteno sur la altaro leviĝis kaj post ĝi, inter la saltantaj fulmoj, aperis strangaj kreaĵoj, duone homaj, duone bestaj, strange kunvolvitaj kaj miksitaj.

Subite ĉio eksilentis, kaj Beroes malrapide leviĝis super la kapojn de la asistantaj pastroj.

* * *

Je la sepa horo matene, la Harranano Phut revenis en la fenician gastejon «Sub la Ŝipo». Liaj sakoj kaj kestoj estis jam retrovitaj. Kelke da minutoj post li revenis la konfidato de Asarhadon; la mastro kondukis lin en la kelon kaj demandis mallonge:

- Kio?...

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPRANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO**

Tfn° (00 34) 615 427 143

**Retskribu al jesuo@ono.com**

http://www.gazetoteko.eu/kajeroj/k74.html

http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k74.html




Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.
ISSN 1697-6460